

Sylvia Hämäläinen:

El la historio de la ILEI-sekcio en Finnlando

Post la dua mondmilito Esperanto-agado en ĉiuj fakoj kaj landoj komencis vekigi en 1945. Jam en 1910 estis fondita Internacia Asocio de Instruistoj (IAI), sed multaj post la unua mondmilito ekŝiĝis el IAI kaj fondis en 1924 Tutmondan Asocion de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE). Aŭtune 1945 S-ro P.Korte el TAGE el Nederlando kontaktis prezidanton Joel Vilkki. Li skribis al Vilkki pri la planoj revivigi la internacian agadon. Pri la antaŭa partopreno de finnlandaj instruistoj en tiuj internaciaj kontaktoj ne konserviĝis materialo. TAGE ankaŭ eldonis Internacian Pedagogian Revuon (IPR), sed en tiu situacio ne havis monon por daŭrigi la eldonadon. S-ro Korte jam kontaktis TAGE-anojn en Svedujo kaj Anglujo kaj laŭ la opinioj de ili kaj li mem li verkis planon por la estonta laboro.

La kerno de la plano estis grupigi la gekolegojn esperantistajn en ĉiu lando. Iu persono devus serĉi la adresojn de la aliaj, starigi landan estraron kaj komenci propagadon inter la kolegoj. Poste oni devus pensi pri eldono de iu internacia interkontaktilo por ligi diverslandajn instruistarojn, kiel antaŭ la milito IPR faris. Ankaŭ devus esti pridiskutata formo kaj eblecoj de internacia asocio. P.Korte promesis provisoro funkcii kiel centro inter la diverslandaj kunlaborantoj kaj fari la unuajn propagandajn laborojn.

Hannes Koivu kiel sekretario iĝis la kontaktulo en Finnlando. En januaro 1946 li raportis al P.Korte pri la membraro de ELFI, ke estis 19 dumvivaj membroj kaj 19 jarmembroj. La Ligo dum lastaj tri jaroj ne kolektis membrotizojn pro manko de aktiva agado. Sed post lastsomera (1945) ĝenerala kunveno de la Ligo la aktivado plivigliĝis. Al la du ŝtataj komitatoj, kiuj prilaboris renovigon de la lernsistemoj de seminarioj kaj popollernejoj, estis donitaj petskriboj kun rekomena eldiro de profesoro G.J.Ramstedt pri enduko de Esperanto en la nomitajn lernejojn.

Hannes Koivu ankaŭ kontaktis la gekolegojn en Svedujo rakontante, krom la saman kiel al P.Korte, aldone sekve: "En Helsinki la inspektoroj de popollernejoj estas favoraj al Esperanto sed la instruistaro plejparte estas indiferenta. Partopreno de svedaj gekolegoj en la venontsomera Esperanto-semajno estus por ni tre ĝojiga." Tio efektiviĝis kaj almenaŭ la internacia instruisto Tiberiu Morariu instruis en la kurso en Taipalsaari.

Pri la finna instruista kaj lerneja Esperanta agado Hannes Koivu, la sekretario, julie 1948 raportis al la Belgia Grupo por Instruistoj: "La Finnlanda Esperanta revuo Esperanta Finnlando eldonis en majo 1948 propagando-numeron por instruistoj disdonitan en 11 mil ekzempleroj. En ĝi la tri direktoroj de lerneja supera administrejo donis ĉiuj aparte rekomendon por studo de Esperanto. Tamen la rezulto estas preskaŭ nulo, ĉar la instruistoj, kiuj scias la aliajn lingvojn malrespektas Esperanton kaj la aliaj penas studadi la anglan lingvon (kiun ili neniam eĉ kontentige lernas) por povi fieri pri sia studado."

Poste la kunlaboro daŭrigis kun Internacia Instruista Kunlaborado (IIK), kies centra oficejo situis en Uddevalla en Svedio. En la jarraporto 1947 de ELFI estas menciita, ke estis fondita neoficiala organizaĵo por internacia kunlaboro de instruistoj kaj tiu jam havas delegiton en 30 landoj. 1948 venis cirkulero el Uddevalla de Einar Dahl (el IIK), kun peto raporti la situacion en Finnlando koncerne instuadon de Esperanto en lernejoj. Konservigis nedatita sugestita konstitucio por fondota organizaĵo kun la nomo Internacia Ligo de Esperantistaj Geinstruistoj. Estis plano, ke la nova organizaĵo funkciu ek de julio 1949, por ke la komitatoj kunvenu dum la UEA-kongreso 1949 en Bournemouth, Britio. Tie estis fondita *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kun la celo kunligi instruistojn kaj edukistojn, kiuj scias Esperanton por proksimigi la instruadon de Esperanto en lernejoj, pritrakti pedagogiajn temojn, favore*

influi edukajn instancojn, kaj eduki instruistojn kaj lernantojn je sento de internacia solidareco kaj reciproka estimo, interfratiĝo kaj interhelpado. Kiel la prezidanto estis elektita Violet C. Nixon el Britio.

Violet C. Nixon skribis la 18an de aprilo 1950: "Estimata samideano. Kun granda plezuro mi ricevis la informon, ke la Finnlanda Esperanto-Ligo de Instruistoj elektis rektoron J.Vilkki kiel sian reprezentanton al ILEI. Ĉar vi estas organizita societo instruista, via reprezentanto rajtas esti komitatano de ILEI, ĉar via societo rajtas esti membra societo. Vi estas do la kvina societo de nia Ligo. – Bedaŭrinde la informo ne estos en la UEA Jarlibro ĉar tiu jam eldoniĝis, sed estonte kaj kiel eble plej baldaŭ, en la Juna Vivo, nia oficiala informilo."

Eble la antaŭskribita estis respondo al informpeto pri la ebleco membriĝi, ĉar la 4an de decembro la prezidantino denove skribis: "Kun granda plezuro mi nun konstatas, ke via Ligo aliĝas, kiel membra societo al ILEI. Via reprezentanto, s-ro Vilkki, nun estas komitatano de la Ligo. Mi kore bonvenigas vin." La aliĝo okazis do en 1950 kaj estis ricevita la regularo de ILEI.

Laŭ la agadraporto de ILEI pri la agadjaro 1950–51 apartenis al ĝi kvin landaj societoj (Germanujo, Francujo, Nederlando, Britio kaj Svedujo) kaj reprezentantoj el 20 landoj, unu el ili Finnlando. Estis aparta mencio, ke komitatano estis s-ro Joel Vilkki el Finnlando. La estraro konsistis el kvin membroj po unu el ĉiu membresekcio. Manskribe estas aldonite, ke komitato konsistas el ses membroj (reprezentantoj de la ligoj) el kiuj kvin apartenas al la estraro. Tiuj scioj diferencas el la antaŭaj de la prezidantino.

En 1953 estis informita al ILEI ke "ni (ELFI) pagos la kotizon, se eblos ricevi valuton".